

Arkiv 17/8

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1998:3

*Kongress
och jubileum
i Stockholm*

*Esperanto
som genväg
till svenska*

*Nyheter om
esperanto från
hela världen*

*Esperanto-
lärare söks till
Helsingborg*

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Aŭgusto 1998 • 86-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion:

Jan Setréus
Franko Luin (teknisk redaktör)

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: HA Reklamtryck, Stockholm

Prenumeration 1998: 170 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: sef@esperanto.se
www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1998:

Direktansluten medlem 170 kr.
Famijmedlem (utan tidning) 75 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 75 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*.

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Hemsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som EsperantoCentro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Bertil Nilsson

Manusstopp den 30/8 (delvis info-nr)

Manus till La Espero

sänds till Jan Setréus
Mörtg. 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden
(tel./fax 08 - 717 75 67)

Keiko, denove



En la pasinta numero aperis memprezento de Keiko, sed neniu foto. Por rekompenci la mankon nun aperas foto, sed neniu memprezento.

ESPERANTOFÖRBUNDETS STYRELSE

Ordförande: Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Haninge, tel. 08-7774175

Vice ordförande: Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-7128291

Sekreterare: Wim Posthuma, Soldatgatan 40, 723 45 Västerås, tel. 021-133529

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-412205

Ledamöter: Anna-Lena Eriksson, Södra Drottninggatan 17, 4 tr, 451 40 Uddevalla, tel. 0522-30128
Karl-Gustaf Gustafsson, Aspv. 1A, 541 48 Skövde, tel. 0500-430973
Boo Mee Lindblom, Stenbockens g. 102, 136 62 Haninge, tel. 08-7774175
Bengt Nordlöf, Boforsg. 23, 123 46 Farsta, tel. 08-934170
Jan Setréus, Mörtg. 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden, tel. 08-7177567

SEJU:S STYRELSE

Ordförande: Anna-Lena Eriksson, Södra Drottninggatan 17, 4 tr, 451 40 Uddevalla, tel. 0522-30128, <anna-lena@esperanto.nu>

Vice ordförande: Håkan Lundberg, Fisksätra Torg 12, 4 tr, 133 41 Saltsjöbaden, tel. 08-7175176, Hokan@esperanto.nu

Sekreterare: Keiko Snarberg, Briljantgatan 12, 421 49 Västra Frölunda, tel. 031-7090039, keiko@esperanto.nu


Kassör: Fredrik Olofsson, Idrottsvägen 19B, 461 40 Trollhättan, tel. 0520-10656, fredrik@esperanto.se

Ledamöter: Ralf Fröhlich, Haga Östergata 5H, 413 01 Göteborg, tel. 031-135671, <gion@hotmail.com>

Emil Josefsson, Grankottevägen 229A, 702 21 Örebro, tel. 019-362466, <Emil.JosefssonH97@stud.hoe.se>

Janko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-7128291, <janko@esperanto.se>

Henrik Randehed, Ragnvallagatan 30C, 256 63 Helsingborg, tel. 042-155996, aktiva.esperantoklubo@helsingborg.mail.telia.com

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

Impresoj de la SEF-kongreso

La ĉi-jara sveda Esperantokongreso okazis en Stockholm aŭ pli precize en hotelo Fogg en Nacka. La vendreda parto tamen estis en Fjällgatan, belegra loko, de kie oni povis vidi la tutan urbon kontraŭ la blublanka vespera ĉielo. Hotelo Fogg estas tre komforta kunvenejo kun bongusta manĝo.

La tute sendramatikan jarkunvenon gvidis Bertil Andreasson. Ni tamen ŝanĝis la statuton laŭ la pasintjara, unua decido, tiel ke la jarkongreso nun ĉiujare decidis kiom da membroj la estraro havos. Ni ankaŭ akceptis proponon de la estraro faciligi decidojn pri la diversaj jarkotizoj, tiel ke la kotizoj por gejunuloj estos duonon de la kotizo por plenpagantoj, kaj ke ĉiuj personoj, kiuj havas la saman

adreson, kune pagos nur 150 procentojn de la kotizo por unu plenpaganto.

La sola ŝanĝo en la estraro estis ke la prezidanto de SEJU, Anna-Lena Eriksson, anstataŭis la malnovan reprezentanton de SEJU, Fredrik Olofsson. Dum la jarkunveno ni estis informitaj ke KELJ donis ne malpli ol 50 mil kronojn al Esperanto-Gården kaj ke Eldona Societo Esperanto heredis preskaŭ 200 000 kronojn, sumon kiu solvis la problemon eldoni la grandan Esperanto-Svedan vortaron, kiun Roland Lindblom k.a. nun prilaboras.

Neniam dum la lastaj jaroj la nombro de partoprenantoj estis tiel malgranda kiel nun, nur 60, sed 10 el ili estis eksterlandanoj kiuj tre favore in-

stigis al ne-krokodilado. Inter la gastoj estis Andrzej Pettyn el Pola Radio kaj Adolf Burkhardt, pastro el Germanio, kiu ankaŭ gvidis diservon. Ambaŭ estas absolute brilaj prelegantoj.

Ankaŭ pluraj blindaj eksterlandanoj partoprenis. El Estonio venis la ĉefdelegito Virve Ernits kaj el Litovio Irena Alijosiute, kiu estas de la litova ŝtato pagata sekretario de Litova Esperanto-Asocio.

La venontjara kongreso estos en Lesjöfors kaj la kongreso en la jaro 2000 eble en Helsingborg. La Universala Kongreso tiam okazos en Tel Aviv en Israelo kaj la kongreso en 2001 en Zagreb en Kroatio.

Haldo Vedin

(El *Kelklinie pri...* 1998:5)

Ankaŭ SEJU jarkunvenis

En la hotelo Fogg's en Nacka okazis la 16-an de majo la ĉi-jara jarkunveno de SEJU. Nova estrarano elektigis, nome Henrik Randehed, kiu aktivis en la Aktiva Esperantoklubo de Helsingborg. Bonvenon al la SEJU-estraro Henrik! Ĉiuj pasintaj estraranoj reelektigis.

Verŝajne preterpasis neniun leganton de *La Espero* la informo ke SEJU organizos KEF en la Esperanto-Domo de Lesjöfors en aŭgusto ĉi-jare. Pri KEF troviĝas nun multege da laboro farenda. Tial devos iom ripozi ĝis post KEF la aliaj kampoj de la SEJU-laboro. Sed jam en frua septembro okazos laborsemajnfino de la SEJU-estraro, kie ni pretigos budĝeton kaj laborplanon por la nuna agadjaro.

Kelke da kampoj tamen ne ripozas. Vojaĝemaj ni estas kiel ĉiam kaj kelkaj el ni planas partopreni en IJK, Internacia Junulara Kongreso de TEJO de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto en Rijeka, Kroatio.

LSU, tio estas Landsrådet för Sveriges Ungdomsorganisationer, estas kupola organizaĵo, kie membras pli ol naŭdek svedaj junularaj organizaĵoj. Kaj ek de januaro 1998 ankaŭ SEJU membras tie. LSU ofertas al siaj membroj multajn interesajn kursojn kaj seminariojn. Ĉu ankaŭ vi volas profiti de tiuj eblecoj kaj reprezenti SEJU-n

tie? Pri la kursoj vi povas legi en la ttpaĝo de LSU ĉe www.lsu.se. Surpape-ran informon vi povas ricevi de la SEJU-prezidanto, kaj estas ŝi al kiu vi anoncu vian eventualan intereson partopreni la kursojn.

Se vi volas mem aktivi en SEJU, ne hezitu kontakti la estraron! Ĉiuj aĝemaj SEJU-anoj estas tre bonvenaj ĉe ni!

Anna-Lena Eriksson

SEJU-anoj kleriĝis en Vaskio

Pri homaj rajtoj estas multo dirinda. Iom de tio estis traktata dum la TEJO-seminario en Vitoria en hispana Vaskio la 26/4-2/5.

TEJO, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, okazigas dufoje jare seminarion pri diversaj temoj kiuj rilatas al junaj homoj. La seminarioj estas subtenataj mone de la Konsilio de Eŭropo, kiu repagas minimume

duonon de la vojaĝkostoj de partoprenantoj. Ĉi-foje la temo estis "Homaj rajtoj sub premo" kaj ĝin partoprenis du SEJU-anoj. Ni ambaŭ estas tre kontentaj pri la seminario kiu enhavis prelegojn, diskutrodojn kaj pensigajn ludojn rilate al la temo. La lasta tago dediĉigis al diskuto pri kiampolitiko TEJO havu pri la homaj rajtoj kaj post iom da laboro pretigis proponon kiun pludiskutos la "TEJO-moŝto" en Kroatio ĉi-somere dum IJK.

Ankaŭ pri la vaska kulturo ni kleriĝis kun la helpo de niaj surlokaj gastigantoj kiuj verve kunprenis nin al koncertoj, trinkejoj kaj festivaloj. Ni vizitis la vaskan parlamenton kaj tie informiĝis pri la reĝimo de la parte aŭtonoma regiono de la hispana ŝtato.

La venonta TEJO-seminario estos en Budapeŝto en oktobro kaj tiam traktigos lingvaj rajtoj kaj la lingvopolitiko de TEJO. Tie la kondiĉoj estas eĉ pli favoraj: ĉiuj vojaĝkostoj estos repagitaj kaj la seminario estas luksa. Do se vin interesas lingva politiko kaj vi aĝas maksimume 30 jarojn kontaktu la SEJU-estraron por pliaj informoj pri la aŭtuna seminario!

Anna-Lena@esperanto.nu
Hokan@esperanto.nu

100-jara jubileo en Stockholm

Tiuj, kiuj la 4-an de aprilo aliris la kavaliran salonon de la Hartwiga domo en nia urboparto Söder travivis memorindan posttagmezon. Prezidanto Anita Dagmarsdotter povis bonven-saluti kvardekon da membroj por kune celebri la 100-jaran jubileon de esperanto en Stockholm. Lerta teamo preparis, aranĝis kaj efektivigis tre agrablan kunestadon en amikeca etoso.

Ĉetabile ni ĝuis delikatan tripartan

manĝon kaj kafon kun delikata torto. Paŭzojn ni povis eluzi ne nur per kon-versacie interŝanĝi interesajn deta-lojn el niaj vivoj en Esperantujo, sed ankaŭ aŭskultante belan kantadon de Nataŝa Berce kun gitaro. Ŝi eĉ gvi-dis niajn komunajn voĉojn en kanta-do el preparita kantfolio.

Teatraĵeto pri la komenco

Veran kulturan gemon formis teatraĵeto pri la klopodo de Maja Fornander krei esperantistan klubon en Stockholm antaŭ, jes ja, cent jaroj! (Vi povis legi pri tiu kuraĝa kaj agema vi-rino en EKSpreso 1/1998, p.4). Klubanoj Soli Berglund Lidén kaj Kerstin Kristoferson impres montris profesian talenton kiel la du rolantoj, eĉ en kolorriĉaj fino-de-jarcento-ekipoj.

Plua historia retrospekto estis, eĉ se pli "seka", sinsekvo de memorindaj okazintaĵoj, buŝe prezentitaj de Anita D. kaj Birger Viggen. Alian retrospek-ton prezentis kompreneble aro da fotoj el la pasinta kluba vivo, almenaŭ la plej proksimaj kvindek jaroj. Plej aĝa verŝajne estis grupfoto pri "su-perjara festo" 23.2 1944. Inter la tiamaj 25 klubanoj estis rekoneblaj du, kiuj ĉeestis ankaŭ la nunan feston, nome Gun Gerdman kaj Anna-Lisa Ahlrén.

Salutoj enlandaj kaj eksterlandaj

Fasko da bonsalutoj kaj gratuloj, en-kaj eksterlandaj estis laŭlegataj de la prezidanto, kaj unu estis proprabuŝe transdonita de bulgara samideano el Sofio, Liliĝa Gerogjeva, pormomente en Svedio.

Inter la gratulantoj troviĝis, kompreneble, ankaŭ SEF, kiu, enkorpigita de sia prezidanto Roland Lindblom, anoncis transdonon de du mil kronoj por uzo kiel stipendio al lingvistud-anto(j), ekz. en Esperanto-Gården, Le-jöfors. Bone semi por frua rikolto en la dua jarcento, ĉu ne! Ingrid Ottosson fine esprimis la dankemon de la par-toprenintoj al la aranĝintoj kaj iliaj helpantoj por neforgesebla jubilea festeno.

Åke Ahlrén (n. 1918)
(El EKSpreso 2/1998)

ProCom '98 kun Esperantlingva parto

Okaze de la 100-jariĝo de Eugen Wüster (nask. 3.10 1898), fondinto de la terminologio-scienco kaj kunfond-into de la esperantologio, en Vieno (24 - 26.8 1998) okazos du inter si li-gitaj konferencoj:

- 1 Scienca konferenco: "Profesia komunikado, terminologio kaj planlingvoj".
- 2 Kvara Infoterm-simpozio: "Terminologia laboro kaj scio-transigo"

Ambaŭ konferencojn kune organizas Internacia Instituto pri Terminologi-sciencia Esploro (IITF), Internacia In-formcentro pri Terminologio (Info-term), Internacia Esperanto-Muzeo Wien (IEMW) kaj la Aŭstria UNESKO-komisiono.

Al la oficialaj subtenantoj de la konferenco i.a. apartenas UEA kaj la germana Societo Pri Interlingvistiko (GIL).

La oficialaj konferenclingvoj estas la angla, franca, germana kaj Espe-ranto.

Al la konferencoprogramo apartenas komuna malfermo por ambaŭ konferencoj, kun prelegoj pri la vivo, verko kaj scienca signifo de Eugen Wüster, i.a. kun kontribuo de Detlev Blanke ("Terminologio kaj planling-voj").

La 1-a konferenco krome enhavos la sektion "Terminologio-scienco kaj planlingvoj" (gvidata de Blanke). La konferenca oferto inkludas specialan ekspozicion de la Internacia Esperan-to-Muzeo. Herber Mayer apartenas al la organiza kaj Detlev Blanke al la programa komitatoj.

Interlingvistoj kaj esperantologoj partoprenu la duoblan konferencon, resp. almenaŭ la prilingvan sektion! Ĝi traktos la rilatojn de Wüster al planlingvoj, lian signifon kiel esperantologo en pasinteco kaj nuntempo, la rilatojn inter planlingvoj kaj termi-nologio-scienco, terminologiajn akti-vecojn en Esperanto k.s. La prelegoj estos publikigitaj de TermNet en aparta volumo.

Interesuloj pro **organizaj deman-do**j (pluaj informoj, alĝilo, tranoktoj, invitiloj k.t.p.) sin direktu (en la ger-mana aŭ la angla) al la loka organiz-anto:

TermNet,
Simmeringer Hauptstr. 24,
A-1110 Wien,
tel. +43-1-74040 280
fakso +43-1-74040 281 /
reto: termnet@termnet.at

El la kluba historio

Antaŭ cent jaroj oni povis legi la sekvan noticon en la ga-zeto Lingvo Internacia No 1 1898:

El Stockholm skribas al ni konata Esperantistino M F: "Mi ĉiam atendas, atendas, atendas . . . Kial oni ne dezi-ras fondi klubon Esperantistan en Stockholm? En la pas-inta somero estis ja ĉe ni plej brilanta okazo de efikado por nia lingvo; oni diras aŭ murmuris ke unu klubo fondiĝis. Tamen oni devas konfesi ke tiu ĉi klubo estas plej silenta en mondo, ŝajne konsistas el nur silentuloj! Ĉar ne eĉ unu vorton ĝi diris al la publiko. Ĝi eĉ konservas sian silent-adon ĝis tiu grado, ke ĝi ne respondas je leteroj direktitaj al ĝi. Nome mi en la pasinta somero, kiam pasigis ĉe mi rusa esperantistino kelkajn semajnojn, skribis al unu "fondanta membro" de tiu ĉi klubo kaj demandis pri adre-soj de aliaj esperantistoj, kiuj eble dezirus konatiĝi kun mia rusa gasto - sed eĉ murmureton mi ne aŭdis, aŭ lite-ron mi ne vidis de tiu ĉi sinjoro.

Kaj tamen mi scias, ke en Stockholm vivas multaj, eĉ multegaj, virinoj konantaj nian lingvon kaj dezirantaj perfektigi en ĝi: kial do oni ne volas doni al ili helpan man-on? Fondiĝo de klubo Esperantista en Stockholm estas necesega: ni nur serĉas la **viron**. Ĉu li ne venos? Aŭ po-vas esti, ke sinjoroj ne deziras helpi al la sinjorinoj en la afero de Esperanto. Tiam ili, eble, unu tagon estos surpriz-itaj per la fondiĝo de "La klubo esperantista de sinjorinoj" en Stockholm! Kaj tie ili ne estos enlasitaj."

En 100 år gammal tidsbild.

Maja Fornander efterlyste en man, som kunde starta en esperantoklubb i Stockholm, där många kvinnor ville lära sig eller bättra på sina språkkunskaper.

Detta var i en tid, då kvinnan inte var myndig. Som tur var fanns det också manliga esperantister, som saknade klubb, och så var det hela igång . . .

(Ur EKSpreso 1/1998)

Esperantos propedeutiska värde

Undertecknad har i 10 år drivit en Internationell esperanto-linje vid Karlskoga Folkhögskola. Elever från 18 nationer har redan deltagit. De flesta avlägger en internationell examen, gångbar världen över. Många elever pratar redan utmärkt efter ett par månader. En EU-tolk kunde redan efter 5 dagar föra ett kvällssamtal med en estnisk läkare – helt på esperanto.

"Aldrig hade jag kunnat föreställa mig att det var möjligt att lära sig ett språk så snabbt", var tolkens spontana kommentar.

Lika intressant är esperantos propedeutiska värde. Via esperanto lär man sig nästa språk mycket snabbare. Självklart är varje språk bra för inläring av annat språk men inte tillnärmelsevis i samma grad. Medan nationella språk har mängder av undantag, oregelbundenheter, förvillande uttalsregler etc. och för många är omöjliga att helt lära sig, skapar de också en osäkerhet, frustration och känsla av otillräcklighet hos den studerande. Esperanto, däremot, som är logiskt, har regler i stort sett helt utan undantag och är helt fonetiskt, skapar snabbt hos eleven en säkerhet, glädje i lärandet, ja helt enkelt en perfekt modell för inläring av andra språk. När en elev redan efter några veckor kan uttrycka sig på språket, skriva en enkel uppsats etc. skapar det naturligtvis också på det psykologiska planet en övertygelse om att "jag kan, det fungerar, jag vill lära mer".

Under 10 år har jag fått många exempel på det propedeutiska värdet av esperanto. De är så sensationella att många skolpolitiker, lärare och etablerade inte vill tro eller lyssna på resultaten. Det är därför viktigt att journalister, radio och TV informerar om detta! Här följer några exempel:

Efter 4 månaders studier i esperanto vid esperantolinjen vid Karlskoga Folkhögskola tog kinesen Basheng Chen Internationell Examen. Han hade inte läst esperanto tidigare – hans förmåga att tala esperanto visades i *Tvärsnytt* och *Landet runt* dec.-97. Därefter fortsatte han att studera svenska. Efter två och en halv vecka pratar han svenska – bevisat när journalister intervjuar honom i Radio Örebro 28/1 - 98 och i Karlskoga Tidning den 29/1 - 98. Eftersom programmet även sändes i P4, väckte det stort intresse bland allmänheten. Det kanske bör tilläggas att Basheng under de första fyra månaderna i Sverige endast satt med högst två lektioner per vecka i svenskgrupp för att lyssna. Som heltidsstudeand på Esperantolinjen pratade han utslutande esperanto och i sin värdfamilj kinesiska.

En elev på Esperantolinjen, Eva Otsa, nu studierektor på Engelska Skolan i Tallinn, kom tillbaka till sitt land och pratade både esperanto och svenska. Via esperanto hade hon enkelt och på egen hand "även plockat

upp" svenska på fritiden. Jag fick sedan förfrågan från Estland om de kunde få skicka språklärare till vår skola för att lära sig esperanto och samtidigt svenska på så kort tid, men tyvärr ville inte svenska myndigheter samarbeta i detta projekt.

En ung tysk pojke lärde sig esperanto på vår skola med rekordfart. På sommaren undervisade han på skolans internationella esperantokurs i konversation och fick högsta beröm av bl.a. tidigare skolråd. Han fick till slut efter enträgen begäran – eftersom de andra eleverna läst svenska tidigare – deltaga i skolans svenskutbildning och var inom kort den bästa eleven i svenska tack vare – hans egna ord – det föregående studiet av esperanto. Han tog sedan svensk studentexamen och är nu bl.a. verksam inom EU:s ungdomsråd med kontakter med UNESCO, FN etc.

Internationellt har man alltsedan 1920-talet fram till nu gjort tester om hur snabbt man kan lära sig esperanto och dess utomordentligt goda propedeutiska värde i språkutbildning. Alla finns noggrant dokumenterade. Här några exempel:

I Paderborn i Tyskland testade man hur mycket tyska elever kunde i engelska efter 1.300 timmar. Därefter undervisade man tyska elever i esperanto och det visade sig att de uppnådde samma språknivå redan efter knappt 170 timmar, alltså 8 gånger snabbare. Det visade sig också att dessa esperantoelever klarade sig mycket bra i andra skolämnen som geografi, matematik.

I Egerton Park i England fick en grupp läsa franska i 4 år. En annan likvärdig grupp läste esperanto 1 år och franska 3 år. Den senare gruppens elever kunde lika mycket franska, ibland mer än den grupp som bara läst franska – plus att de hade fått kunskaper i ytterligare ett språk.

En annan liknande undersökning vid universitetet i Heidelberg bekräftar esperantos goda propedeutiska värde:

Elever delades upp i två likvärdiga grupper. Den första gruppen fick studera tyska i 200 timmar. Den andra fick 100 timmar esperanto och sedan 100 timmar tyska. I test visade det sig att den andra gruppen, som bara hade läst tyska halva tiden, kunde mest tyska och dessutom hade goda kunskaper i ett internationellt språk.

Naturligtvis hade den också påverkats i globalt tänkande, rättvise-, solidaritets- och fredsfrågor och var benägen att studera flera språk.

Vid nyligen gjorda språktester 1996 i Österrike, Kroatien och Slovenien har det visat sig att elever med esperantostudier redan efter ett år lyckas 30 – 35% bättre i tyska och engelska än andra elever. Tendensen vid ytterligare Esperantostudier pekar på 80% förbättring gentemot andra elever.

En mängd tester finns att visa på och det framkommer att esperanto alltid snabbar upp följande språkinläring. I vissa fall lär man sig två språk lika snabbt som ett och är förberedd på lyckade språkstudier framgent.

Vi måste betänka hur esperanto skulle kunna vara tidsbesparande i våra skolor och ge utrymme för flera språk för våra elever – något som är ett måste i framtiden – i pengar och resurser, i högre kvalitet och förmåga hos våra elever och kanske framförallt en förståelse hos vår nya generation i frågor som förståelse, antirasism och solidaritet, internationella kontakter och fredsfrågor och en fördjupad kunskap om mångfald, rättvisa, miljö, globalt tänkande och överlevnad.

Tack och lov har man lite varstans i världen börjat uppmärksamma esperantos betydelse i skolor, på universitet och inom ex. EU – 120 EU-parlamentariker stöder redan esperanto och f.d. nobelpristagaren i ekonomi Reinhard Selten arbetar som esperantist inom EU för språkfrågan, som eljest är mer eller mindre tabu. I vissa skolor börjar man med esperanto för att alla elever ska få en bra grund att stå på för kommande språkstudier.

Dessa resultat får inte tigas ihjäl eller nonchaleras. Jag hoppas att Du, som har en viktig informationsplattform i samhället, vill medverka till att sprida dessa kunskaper och resultat till allmänhet, myndigheter och massmedia. Till slut måste ju dessa fakta komma upp till ytan. Jag tackar på förhand!

Lars Forsman

ĈU LA BESTOJ
INTERPAROLAS?

Genvägen till språket

Parto de la sabata programero Naturmorgon (Naturmateno) de la Sveda Radio antaŭ nelonge estis dediĉita al demandoj de la aŭskultantoj.

Unu demando temis pri la sono de granda paruo kiu estus naskita (pro homa interveno) en la nesto de blua paruo, ĉu ĝi kantus kiel grandaj aŭ bluj paruoj. La respondo estis, ke ĝia sono verŝajne estus inter tiu de la granda kaj blua paruoj. La paruoj ofte vivas en birdaroj, kaj precipe la altaj sonoj estas tre similaj inter la malsamaj specioj. Tiujn sonojn la birdoj uzas por kontaktigi inter la specioj. Oni povus diri laŭ la respondanto ke tiuj birdoj "trovis Esperanton de la paruoj".

För fem månader sedan kom Basheng Chen från sydöstra Kina till Karlskoga folkhögskola. Han kom för att lära sig esperanto och gjorde det på avsedda 16 veckor, men han bad att få stanna och lära sig svenska när han ändå var här och igång.

Efter tre veckors studerande görs den här intervjun – på svenska.

Uttalet är inte svårt att förstå och med tanke på den korta inlärningsstiden så är ordförrådet sensationellt.

– Så vacker snö har vi inte i sydöstra Kina. Lite snö ibland, men inte så vackert.

På frågan om vädret där ger Basheng Chen klart besked.

– Det är 5 – 9 grader på hösten och 27 – 33 på sommaren.

– Nej 27 – 38 grader varmt på sommaren. Det är varmt.

Vill bli språklärare

Han berättar och svarar på frågor. Han kom hit i höstas för att läsa 16 veckor esperanto. Han bor hos släktingar i Karlskoga, men hemma hos dem pratas det bara kinesiska så svenskstudierna får ingen gratishjälp där.

Han hoppas bli lärare i esperanto, svenska eller engelska när han kommer tillbaka till Kina. Han reser tillbaka i maj.

– Jag har aldrig hört något liknande, säger Lars Forsman, esperantoutusiast och Baheng Chens lärare.

Ändå har Lars Forsman hört mycket under tio års esperantoun-

dervisning och hans tilltro till esperanto är mycket stor.

Det är esperantons förtjänst att det går lätt att lära sig nästa språk, förklarar han och anser att det genom exemplens mängd är bevisat – informellt. I officiella språklärsammanhang låtsas man inte om sådana teorier...

Esperantokurserna startades för tio år sedan vid folkhögskolan i Karlskoga. Det är Sveriges enda längre utbildning för esperanto. Den enda i norra Europa faktiskt och den har, säger Lars Forsman, blivit världsberömd.

Världsrykte fyller kurserna

Det sker genom de elever som kommer för att gå den 16-veckorskurs som ger en internationellt gångbar examen i esperanto.

De, eleverna, kommer numera från hela världen.

Den första kursen var ett test och då var det folk i bygden, Lars Forsmans bekanta till stor del, som deltog. Men intresset väcktes. Den åttaveckorskursen byggdes ut till hel termin, alltså 16 veckor och sedan blev det en kurs till och en kurs till. Varje höst- och många vårterminer sedan dess har man en heltids esperantoklass vid Karlskoga folkhögskola. 15 elever är det tänkt, det blir 16 eller 17 ibland. Annonseringen förekommer i stort sett inte. Tidigare kursdeltagares rekommendationer räcker för att fylla grupperna.

– Vi har haft deltagare från 38 länder hittills.

– Kina, Japan, Zimbabwe, Uganda, Norge, Danmark... räknar Basheng Chen upp och det är inget problem att förstå vad han säger och han tvekar inte att försöka säga det han vill – på svenska.

– Svensk grammatik är svår, inte orden, säger han.

– Svensk grammatik är lika esperanto. Många ord är lika.

Samma tarmsystem

På frågan kan han inte komma på några ord som är lika på svenska och kinesiska, men...

– Blindtarm är uppbyggt likadant på kinesiska: blind och tarm. Och tolvfingertarm är tolv fingrar och tarm på både svenska och kinesiska.

För att öva vidare på svenska går han till biblioteket i K-center och läser böcker på lätt svenska. Och han lyssnar på kassetter och lär sig ord och uttal.

I maj kan han förmodligen karlskogamål.

Han är redan medveten om dialekter och berättar om hur dialekterna i Kina skiljer sig från mandarin, som kinesiska egentligen heter.

Hans Jansson

(Ur Karlskoga Tidning 29/1 1998)

Aperis bio(biblio)grafio de Nikola Aleksiev

Martinov, Dimov: Nikola Aleksiev. Biobibliografio. Sofio 1988: Socio kaj esperanto, 39 p., broš.

Nikola Aleksiev apartenas al la plej gravaj figuroj de la postmilita Esperanto-movado. Kiel prezidanto de BEA kaj de MEM, kiel multjara komitatano de UEA (nun honoro membro) li grave influis la movadon, aparte kaj tre sukcesse utiligante la specifajn kondiĉojn en orienta Eŭropo. Sed li ankaŭ ekster tiu medio estis alte estimata pro lia honesta kaj efika agado je la bono de Esperanto.

Aleksiev (nask. 29.6.1909) estas ĵurnalista, kiu abunde verkis en Esperanto kaj la bulgara. La broŝuro entenas lian biografian skizon kaj la verŝajne ne tute kompletan biografion de liaj publikaĵoj (en la bulgara kaj en Esperanto) pri temoj ligitaj al Esperanto, ties historio, movado kaj aktivuloj. Ni trovas la mension de 16 libroj kaj broŝuroj, diversajn tradukojn en Esperanto el la bulgara (5), el la bulgara kaj angla (1), el la rusa (3), el la franca (2) kaj el Esperanto en la bulgaran (3). Ni krome trovas liajn kontribuojn en 6 antologioj. Li redaktis 3 librojn kaj verkis inter 1929 - 1997 309 artikolojn. La bibliografio krome listigas 72 recenzojn pri liaj verkoj kaj 75 artikolojn pri lia vivo kaj verko.

Detlev Blanke

Ledig plats

Esperantolärare söks till gymnasieskola i Helsingborg. 4 vtr ev. utökat. Sökande bör vara beredd att flytta och att också arbeta med klubb- och ungdomsverksamhet då 2/3 av våra medlemmar är under 20 år.

Stor vikt kommer att läggas på personlig lämplighet.

För ytterligare upplysningar kontakta:

Aktiva Esperantoklubo de Helsingborg

SYO-konsulent Čel Randehed

tel. 0704 - 288160

Även skriftliga anmälningar adress:

Ragnvallagatan 30 C

256 63 Helsingborg

Rekorda partopreno en la elektoj de UEA

NOVA PREZIDANTO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Geraldo Mattos estis elektita prezidanto de la Akademio de Esperanto per 27 voĉoj, kontraŭ 10 voĉoj por Perla Ari Martinelli. Christer Kiselman kaj Michel Duc Goninaz estis elektitaj vicprezidantoj kaj Renato Corsetti sekretario.

2328 individuaj membroj de UEA partoprenis la elektadon de la komitatanoj B, kiuj en la supera organo de UEA reprezentas la individuajn membraron. Tio estas 33,64% el la dissenditaj 6920 balotiloj. Temas pri nova rekordo de partopren-aktiveco ekde 1980, kiam ĉiuj individuaj membroj unuafoje rajtis partopreni en la balotado. Antaŭe voĉdonis nur la delegitoj.

Al la grandega kresko de aktiveco parte kontribuis la granda nombro da kandidatoj: 15 por 8 lokoj. Tio faris la elektadon pli interesa ol antaŭ tri jaroj, kiam pri 8 lokoj konkursis 11 kandidatoj kaj voĉdonis 1388 membroj. Tamen, en 1989 estis eĉ 16 kandidatoj, same por 8 lokoj, sed voĉdonis 1709 membroj. Estas evidente, ke la vigla partopreno montras ĝeneralan aktivigon de la membraro kaj interesiĝon pri la aferoj de sia asocio. Unu el la celoj de Kampanjo 2000, levi la organizan nivelon de la asocio, plenumiĝis do neatendite laŭvorte rilate la balot-aktivecon, kiu neniam antaŭe proksimiĝis al la ĉi-foja nivelo. Temas pri forta apogo de la membraro al la vojo, kiun UEA iris en la lastaj tri jaroj kaj kiun ĝi sekve plu iru. Ne hazarde la ĉampiono de la elektoj estis la ĝisnuna prezidanto de UEA, prof. Lee, kies verko tiu agadlinio estas.

El la 2328 balotiloj 2314 estis validaj. Nevalidaj estis 14 balotiloj, ĉu pro tio ke ili enhavis voĉojn por pli ol 8 kandidatoj, ĉu pro tio ke ili estis subskribitaj de la balotinto kaj sekve ne anonimaj kiel postulite.

Elektitaj kiel Komitatanoj B por la periodo 1998-2001 estas: Lee Chong-Yeong (Korea Respubliko), Atilio Orellana Rojas (Argentino), Amri Wandel (Israelo), Michela Lipari (Italio), Andrzej Pettyn (Pollando), Yamasaki Seiko (Japanio), Katinjo Fetes-Tosegi (Aŭstrio) kaj Aleksander Korĵenkov (Ruslando).

Krom B-komitatanoj, la parlamento de UEA konsistas ankaŭ el la reprezentantoj de aliĝintaj landaj kaj fakaj asocioj (komitatanoj A). Krome, la komitatanoj A kaj B rajtas alekti al la Komitato aparte spertajn kaj kompetentajn movadanojn kiel C-komitatanojn. Ilia nombro povas esti maksimume unu kvarono de la sumo de komitatanoj A kaj B. Aliĝintaj asocioj kun malpli ol 100 membroj rajtas nomumi ne komitatanon A sed observanton sen voĉdonrajto.

La nova Komitato de UEA kunsidos unuafoje la 1-an de aŭgusto en Montpeliero.

el NUN

UEA eldonis gvidilon por krei fakvortojn

Altkvalita faka apliko de Esperanto estas esenca kondiĉo por pli forta rekono de la valoroj de la Internacia Lingvo. Sekve necesas faktekstoj kun taŭgaj fakvortoj, fakvortaroj kun bonaj terminoj. Sed, kie oni komencu? Kie oni trovu fidindajn informfontojn? Kiujn informojn oni kolektu? Kiel oni ordigu kaj registru la informojn? Kiam komputilo nemalhaveblas? Kiel oni tenu la diversajn lingvojn apartaj, skribu difinojn kaj organizu la tutan termino-krean procedon?

Respondojn al tiuj kaj aliaj demandoj en klara kaj facile komprenebla formo, surbaze de la aktualaj normoj de ISO (Internacia Organizo por Normigado), donas la finnino Heidi Suonuuti, multjara manaĝero de Finna Centro por Terminologio kaj prezidantino de Teknika Komitato ISO/TC 37. La 42-paĝa broŝuro, "Terminologia gvidilo", entenas jenajn ĉefajn ĉapitrojn:

- 1 Nocio-analizo,
- 2 Difinoj,
- 3 Terminoj (tipoj, postuloj kaj prefero-indikoj de terminoj),
- 4 Harmoniigo de nocioj kaj terminoj,
- 5 Etapoj de terminologia projekto (laborgrupo, limigo de la fako, fontoj, nombro de la nocioj, plano, kolektado kaj elektado de terminologiaj datumoj, nocio-sistemoj kaj difinoj),
- 6 Terminografio (formo de difino, formo de registraĵoj, vicordo de registraĵoj, perkomputilaj metodoj). Aldonitaj estas vortareto de terminologio kaj elprenebla faldfolio kun la plej gravaj 38 paĝoj en la terminologia laboro.

La gvidilo estis origine verkita laŭ komisiio de Nordterm, komuna asocio de terminologiaj organizoj en Nordio. La Esperanto-version preparis Terminologia Esperanto-Centro de UEA kunlabore kun la aŭtorino.

Heidi Suonuuti (1998): Terminologia gvidilo. El la angla tradukis Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke. Rotterdam: UEA. 38+4p. ISBN 92-9017-057-3. Prezo: 12,00 guldenoj. (Triona rabato ekde 3 ekzempleroj).

OSIEK-premio por Claude Piron

Kiel informis la Esperanto-Redakcio de Pola Radio en intervjuo kun Eugene d'Zilah - la nunjaran OSIEK-premion oni atribuis al la libro de C. Piron "La bona lingvo". Laŭdan mención ricevis ankaŭ la libro "Kuri internacie". Pola Radio faris pri la temo intervjuon kun Herbet Mayer, la eldoninto de la libro, kiu estis iom surprizita pro ĉi tiu honorigo, sed samtempe ĝoja pro la fakto, ke ĉi tiu libro kiu vekis tiom da diskutoj fine trovis la merititan rekono.

Parolante pri la premiita verko Pola Radio rekomendis ĝin al ĉiuj seriozaj lingvouzantoj.

Estas aldoninde, ke ĵus aperis dua eldono de ĉi tiu verko de Piron kaj aperigis ĝin la eldonejo de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

el NUN

Nova libro de alĝeria kantistino

Alĝeri-devena, kinistino, aŭtoro, komponisto-kantistino, Ĝura kreis en 1977 Ĝurguran, grupon konatan de la ĝenerala publiko.

En siaj kantoj ĝi kunligas la ĉarmon de la berbera tradicio kun la riĉaĵoj de la moderna muziko.

Vualo d' l' silento estas ŝia unua libro.

Juna kabilino estas mortkondamnita de sia familio, ĉar ŝi transpaŝis la praaĵn regulojn kaj elektis kiel vivkunulon francon kaj generis kun li infanon.

Tio okazas en Parizo, en 1987, kaj la viktimo de tiu "punekspedicio" estas ja la aŭtorino mem de tiu libro.

En *Vualo d' l' silento* ŝi ne nur rakontas tiun dramon. Ŝi ankaŭ kunprenas nin en la magion de la kabila montaro, priskribas la tragikan folkloron de la helpdomaroj por gastlaboristoj, kaj vipas sen ia ajn politika antaŭjuĝo la nekredoble arkaismajn vivkondiĉojn de iuj islamaj virinoj en la nuntempa Eŭropo. "La vualo", kiun la aŭtorino levas ĉi tie, najbaras al seriozega aktualajo, kiu ne estas limigita - tion oni vidos sur tiuj paĝoj - nur al la surmeto de speciala kaptuko.

Travivita romano, subskribita per sango kaj de kiu oni eliĝas konsternita, alipsanta, admiranta kaj informita.

el NUN

el NUN

Nova brila disertacio en Torino

La 15-an de julio ĉe la Belettra Fakultato de la Universitato de Torino (fako scienco de lakomunikado) Federico Gobbo, 24-jara, tre brile diplomigis per disertacio pri "La dilemo de Esperanto inter helpfunkcio kaj civitanigo". La pli ol 400 paĝa disertacio (raportanto: prof. F. Pennacchiotti) estis longe diskutita antaŭ la juĝanta profesorado kaj meritigis al Gobbo la plej altajn eblajn poentojn (ege malofte donataj en la italaj universitatoj), nome 110/110 kun lawdo, honora mencio kaj deklaro de indo de publikigo.

La disertacio, jam nun konsiderebla klasikajo inter la priesperantaj esploroj, konsistas el tri partoj: Esperanto komunikata, Esperanto komunikanta, Esperanto komunikebla.

el NUN

Latina antologio

La eldonserio "Oriento-Okcidento", auspiciata de UEA, pliriĉigis per nova titolo, "Antologio latina", kiu ĵus aperis ĉe la eldonejo Fonto en Brazilo.

Ĝi konsistas el du volumoj, kiuj kune havas 576 paĝojn. La unua, "Maturiĝo", ampleksas la periodon de ĉ. 250 ĝis 30 a.Kr., kaj la dua, "Epoko de Augusto", ĝis 14 p.Kr. Ĉiuj verkoj estas elektitaj kaj tradukitaj de Gerrit Berveling, kiu planas iam kompletigi la antologion per tria volumo. La du volumoj kostas kune 75 NLG.

Serio "Oriento-Okcidento" estas la plej longedura el ĉiuj kontribuoj de UEA al projektoj de Unesko. Ekde 1961 aperis jam 31 numeritaj kaj 2 ne-numeritaj verkoj en tiu serio, kiu celas kontribui al la Unesko-Programo por Reciproka Studo kaj Aprezado de Kulturoj de Oriento kaj Okcidento.

Pri la akcepto de novaj titoloj en la serio decidis la Estraro de UEA, sed en la eldonado povas partopreni kiu ajn serioza eldonisto, kiu povas plenumi la kvalitajn kaj teknikajn postulojn de la serio.

La nova verko estas la kvara antologio en la serio. En 1981 aperis la 2-voluma "Tutmonda sonoro", antologio de monda poezio en traduko kaj redakto de K. Kalocsay, kaj en 1983 "Elpafu la sagon", kolekto el buŝa poezio de diversaj popoloj kompilita kaj tradukita de Tibor Sekelj. En 1988 aperis la poezia kaj proza "Australia antologio", redaktita de Alan Towsey.

el NUN

INTERRETO

Scivolema enketisto bonvenigas kunlaboron

"Kie vi kutimas aĉeti viajn esperantolibrojn?", "Kiel vi skribas la esperantajjn literojn en via interreta korespondado?" kaj la eterna "Kie vi lernis esperanton?" estas la unuaj tri demandoj al kiuj "Enketisto" ŝatus havi respondojn. Kaj respondi povas ĉiuj kun ligo al la interreto, se ili trovas la vojon al <http://esperanto.nu/enketisto/>.

La enketoj ne postulas multan laboron, nur klakon al unu el la sep aŭ ok alternativoj. Post ĉiu klako la ŝanĝita rezulto estas montrata, kaj grafike kaj procente.

"Enketisto" pretas prepari pli da demandoj, al kiuj unuopaj esperantistoj kaj esperanto-organizoj ŝatus havi respondojn. Ĉar temas pri konstanta servo, la adreso al ĝi ankaŭ estos konstanta kaj facile memorebla.

La 1-an de aŭgusto Enketisto funkcigos "Demando de la monato" kun jes/ne demandoj ĉe <http://esperanto.nu/demando/>. La unua demando estos "Ĉu vi subskribis la Manifeston de Prago?" pro la dujarigo de la Manifesto. Ankaŭ en ĉi tiu kazo la efiko de la unuopa voĉo estos tuj videbla.

Kaj same, por "Demando de la monato" Enketisto bonvenigas proponojn pri farotaj demandoj, ĉar ĉiun monaton venos nova demando. Scivolemuloj povas jam antaŭ la 1-a de aŭgusto konatiĝi kun "Demando de la monato", ĉar restas je la retadreso la demando uzata por la testado de la programo.

Al "Demando de la monato" oni povos voĉdoni nur dum la aktuala monato (sed la rezultoj de pli fruaj monatoj estos daŭre konsulteblaj), dum la ĝeneralaj demandoj bonvenigos voĉdonantojn dum pli longa periodo.

el NUN

"Lingva konsultejo" estas realaĵo

Ekfunkciis "Lingva konsultejo" ĉe <http://esperanto.nu/lingvo/>. Ĝi estas tute nova, sed la ideo estas, ke ĉiu, kiu cerbumas pri vortoj, esprimoj ktp. povu en ĝi peti konsilojn. Tiuj, kiuj kapablas respondi, estas petataj fari

tion. Unu demando povas generi unu aŭ tutan aron da diversaj respondoj.

Kaj la demandoj kaj respondoj restos en "Lingva konsultejo" ankaŭ por estontaj cerbumantoj kaj estos daŭre konsulteblaj.

La celo estas, ke ĝi estu pura lingva konsultejo, ne diskutejo pri projektoj de internaciaj lingvoj, skribreformoj k.s. Alispecaj diskutoj povas okazi je "TTT-diskutejo" (<http://esperanto.nu/ttdisk/>), kie la diskutoj povas temi pri kio ajn, aŭ je "Junulara forumo" (<http://esperanto.nu/junforumo/>), se temas pri specifaj junularaj demandoj.

el NUN

Ekfunkciis publika "klaĉejo" por esperantistoj

Ekfunkciis je la adreso <http://www.esperanto.se/ek/> la esperanto-klaĉejo de SEF, kiel anoncote pli frue en artikolo en *La Espero*. La programigon faris Janko Luin kaj la klaĉejo ŝajnas glate funkcii, sed estas dezirinde, ke ankaŭ aliaj testu ĝin antaŭ ol oni komencas uzi ĝin pli vaste. Raportoj pri siaj spertoj estos tre bonvenaj.

Kio estas "klaĉejo"? Tio estas la esperanta esprimo por la angla "chat" (sed ne traduko!). Se kelkaj konektiĝas samtempe al la supra retadreso, ili povas interbabili, aŭ "klaĉi" inter si, sed skribante mesaĝojn sur la ekrano. Ĉiu mesaĝo tuj aldoniĝas kaj legeblas, tiel ke eblas komenti aŭ respondi kvaŝaŭ dum interparolo. Se pluraj partoprenas, ili ĉiuj povas legi la samajn mesaĝojn samtempe.

La testo povas esti tute simpla afero. Konsentu kun konatulo(j) pri komuna tempo, konektu vin kaj vidu, kio okazas. Se vi ne havas kunklaĉonton, vi rajtas noti vin en speciala taglibro kaj esperi, ke iu rimarkos vian noton kaj eniros la klaĉejon samtempe kiel vi. Estas nome tiel, ke se oni aliras la klaĉejon sen antaŭa interkonsento, tre verŝajne oni ne trovos interparolontojn tie. Sed oni povas provi jen kaj jen kaj povas okazi, ke oni tiel ekhavas novajn amikojn.

Eblas utiligi la klaĉejon ankaŭ por malgrandaj kunvenoj, anstataŭ uzi telefonon. En la klaĉejo de SEF tiuj kunvenoj estas malfermitaj al ĉiuj, kiuj anoncas sin.

Je la adreso <http://www.algonet.se/~inko/kafejo/> funkcias tre simila "virtuala kafejo".

el NUN

NOVA RETGAZETO MAL-SERIOZAS

Ĉe <http://esperanto.nu/male/> ekaperis Male, kiu skribas "malaktuale kaj malinterese pri movadaj mal-kaj okazoj". En unu artikolo ĝi malkaŝas la veron malantaŭ la onidiroj, ke la usona spiona organizo CIA sietempe interesiĝis pri UEA kaj la esperantomovado ĝenerale. Alia artikolo prezentas la plej novan kaj ambician projekton de esperantejo – meze de la Alpoj! Ŝokas la legantojn la informo, ke fraŭlino Barlaston misuzas sian titolon ne plu estante fraŭlino. Nur Male havas la detalojn!

Male ankaŭ malkovras la ekinteresiĝon de la programejo Microsoft pri la internacia lingvo kaj planojn de la Eŭropa Unio akcepti ĝin post kelkaj modifoj. Ĉu vi scias, ke eble vi surhavas kontraŭleĝan verdan stelon? Male estas la sola gazeto, kiu malkovras la decidon, kiu renversas la konsilon de UEA, ke la stelo estu "nek tro granda nek tro malgranda".

Por ke vi havu ideon pri la karaktero de la artikoloj en Male, jen unu el la plej novaj:

"Sen problemoj por esperanto la ŝanĝo al nova jarmilo

La ŝanĝo de jarmilo ne kaŭzos problemojn por esperanto. Tion konstatas la speciala komisiono de Komputila Rondo, kiu dum dek ok monatoj priesploris la demandon. Zamenhof jam en 1887 antaŭvidis la eblajn problemojn kaj indikis la jaron kvarcifere. Esperanto krom tio jam spertis la transiron de la deknaŭa jarcento al la dudeka. La nuna transiro ne implicas aliajn problemojn.

Specialan atenton la komisiono dediĉis al la demando, ĉu Ido povus esti kaŭzita de la ŝanĝo de jarcento. Ĝi konkludas, ke ne eblas trovi iun ajn pruvon pri tio. Laŭ la komisiono Ido kaŭzis cimo¹ – simile kiel ĉiujn postajn proponojn pri skribo- kaj lingvo-reformoj. La cimo ne estas en esperanto mem, sed en la kapoj de la proponintoj. Post unu aŭ du oscedoj flanke de la sen-cimaj uzantoj de esperanto la ĝenoj kutime senspüre malaperas, estas la fina konstato de la komisiono.

(Magda-Lena)¹

¹ cimo = bug

Esperanto kiel nedeviga studfako

En du artikoloj en marto lokaj ĵurnaloj informis pri la sopiro por Esperanto en gimnazioj en Helsingborg. La 12-an de marto Nordvästra Skånes Tidningar publikigis sian artikolon kaj la 23-an de marto Helsingborgs Dagblad faris la samon. Jen el la unua gazeto:

På eget initiativ har gymnasieeleverna på tre skolor drivit igenom införandet av kurser i esperanto. I början fick en av eleverna själv ställa upp som kursledare.

Inför höstterminen 1997 hörde flera gymnasieelever av sig till sina respektive skoledningar och bad om en kurs i esperanto inom det fria valet. Fria valet är ett tillvalsämne som eleverna kan välja. De får betyg i ämnet och får räkna in betyget i betygsgenomsnittet.

Men skoledningarna var måttligt intresserade, men lovade att i alla fall starta en kurs om minst tio elever anmälde sig. När tio faktiskt anmälde sitt intresse höjde skolorna ribban och krävde fler anmälningar för att starta kursen. Då tog de esperantosugna eleverna saken i egna händer.

16 ettor från Olympia-, Nicolai- och Tycho Brahe-skolorna startade två studiecirkel. En på torsdagseftermiddagarna på Olympiaskolan och en hemma hos en av kursdeltagarna, på söndagseftermiddagarna. Cirkelledare blev 17-åriga Henrik Randehe, som läser på samhällsprogrammet på Olympiaskolan.

– Det var nervöst i början, jag är ju ingen van pedagog. Men jag kände de flesta i cirkelarna, så det gick bra. Jag har också haft bra stöd av Svenska Esperantoförbundet, berättar Henrik.

Unikt initiativ

Hela hösten och vintern har nu eleverna pluggat världsspråket. De har berättat för sina kompisar om hur roligt det är. Den här terminen har därför fem nya ettor börjat läsa esperanto och till höstterminen har inte mindre än 29 elever anmält sitt intresse.

– Nu har skolans intresse vaknat. Olympiaskolan har insett att det här är en bra grej för skolan. Rektorn är mycket positiv, berättar Henriks pappa Kjell, som är SYO-konsulent på skolan.

Till hösten blir det därför lärarleda kurser i esperanto som tillvalsämne. En läroplan och kursplan ska nu skrivas ihop. De som läst esperanto

hela vintern ska få genomgå ett prov, så att de "retroaktivt" får ett betyg i ämnet. Kjell Randehe räknar med totalt 50 esperantoelever i höst.

– Det unika är att det är vi elever som tagit initiativet till kursen. Det är första gången i norra Europa. I Huskvarna, där man också har esperantoundervisning, var det lärarna som kom med idén, berättar Henrik.

Esperantointresset är något som far och son Randehe delar. Kjell har talat språket länge och tog med Henrik till världskongressen i Prag i fjor. Det var efter den resan som Henriks intresse vaknade...

Christer Åkerlundh

86-jara debutanto

Ĉi tiun leteron kun ekzemplero de la libro La mirinda rondvojaĝo de Nilĉjo Hansson en Svedio en 1956 (en la sveda kaj en traduko en Esperanto) kaj la rakonto pri Hurligruten ricevis la redakcio de La Espero:

Hej, jag heter Margareta Hansson, fyller 87 år i sept. 1998. Hoppas att vi möts på Bokmässan 1998 i Göteborg. Nu presenterar jag mig till dess på följande sätt.

1. Intervju av Niklas Ohlson inför Bokmässan 1997, citat:

En 86-årig debutant.

Kändisar invaderar bokmässan; Herman Lindqvist, Hugo Claus och Peter Englund. Mitt i grytan hittar vi debutanten Margareta Hansson. Hon är en kvinna som levt parallellt med vårt sekel.

När Margareta Hansson skulle fylla 85 år ville hon dokumentera sitt liv för sina barnbarn och skrev en bok. Hon finansierade det hela själv. Hon gav ut boken "Hörsågen eller nästan sant"...

P.S. Nyligen hörde jag i radio att det i vissa skolor finns trettio olika språk. Det är på tiden att alla barn i hela världen får lära sig läsa sitt modersmål och som andra språk esperanto. Barn och människor slås för att de inte kan prata med varandra.

Grandioza sperto

2500 mejlojn per Hurligruten¹ estis revo kiu realiĝis en junio 1984. De Gotenburgo fervejo per Oslo al Bergeno. De tie Harald Jarl komencis sian vojaĝon Bergeno-Kirkenes kaj reen.

Samtempe alia ŝipo de Hurligruten komencis iroveenan vojaĝon Kirkenes-Bergeno. Tiel estas dum la tuta jaro. Dank' al Gofa Fluo lå maro (*lopehavet*) estas senglacia la tutan jaron. La biletoj de Hurligruten estas kvotitaj en la turista klaso. Specife tio validas por la t.n. *Vojaĝo al la meznokta suno*. Foje oni devas atendi ĝis tri jaroj. Kiam mi kiel pensulinio plendis pri la atendotempo venis malmendo pri tia vojaĝo!

Ke norda Norvegio suferis bombadon dum la dua mondmilito kaj ke la loĝantoj estis devigitajlogi en minpasejoj estis por mi ŝoka informo. Ĉio estis nun rekonstruita. Ni vizitis multajn novkonstruitajn preĝejojn. Unu el la plej belaj estis tiu de Tromsdalen, kiu havas grandan glasmuron. Tie estis rava panoramo de la valo.

En ĉiu haveno kargo kaj pasaĝeroj transportiĝis tien kaj reen. La ŝipoj de Hurligruten estis foje salutitaj de muzikistaroj. La vojaĝantoj en la turista klaso estis tre internaciaj. Granda grupo da kvakeroj el Svislando ne volis mezsomeran dancon! Ĝi estis nuligita! La maristoj estis ornamentaj la malantaŭan ferdekon kun folioj. Kiam ni estis solaj sur la ferdeko, mia edzo invitis min al danco, zumante "Kia estus la vivo Margareta sen kanto kaj danco?" Ni valsis kelke da tempo. Poste ni supreniris sur la promenan ferdekon. Tie ni atendis la enmaran banon de la meznokta suno. La suno glitis malsupren en la maron kaj tuj supreniris. Estis du sunoj sur la foto! Ni kuŝis en niaj apogseĝoj kaj vidis la alvenon de la mezsomera tago. Sur Nordkapp ni povis vidi malsupre la ĉasaviadilojn ĉirkaŭflugi. Ĉi-supre estas memora busto de Oskaro la 2a. Lia vizito en 1873 famigis Nordkapon kiel la landon de la meznokta suno.

Ĉe la monto Håstmannen oni baptis la vojaĝantojn unuafoje trapasintajn la polusan cirklon. Oni tostis por la mardio Neptuno.

La vojaĝo en Troll-fjorden estis mirinda travivaĵo. La altaj rokoj tuj proksime al la ŝipo, la malvastaj pasejoj. Ĉu ni estis revenontaj al la maro? Akompanataj de la bela muziko de Grieg ni revidis la maron.

NUN ni vidis la fincelon. La urbon Bergeno prilumis la vespera suno. La 28an de junio 1984 ni forlasis Harald Jarl, kiu estis nia hejmo dum 12 tagoj kaj noktoj.

Margareta Hansson

Sävedalen la 2an de marto 1995
(trad. de Christer Lörmemark)

¹ Hurligruten estas transporta kaj turista ŝiplinio laŭ la marbordo de meza kaj norda Norvegio.

En *La Espero* 1998:2 p. 7 oni povas legi ke volontuloj pri laboro en Esperanto-Gården ne zorgu pri manĝo aŭ loĝo tie. La loĝo estas senkosta, sed tamen oni devas pagi sian propran manĝon.

Red

La Nilsona Fonduso

Textilarbetare E.S. Nilssons Ideella Fond aĉetadas librojn kaj fonogramojn kaj ankaŭ abonas revuojn por starigi Esperanto-bibliotekon en Gotenburgo. Parto de la libroj deponiĝas en la Urba Biblioteko. (ĉe Götaplatsen). Libretoj/kajeroj, libroj de limigita ĝenerala intereso, sonkasedoj kaj videokasedoj troviĝas en la klubejo kaj prunteblas tie.

La fondusaj libroj deponitaj en la Urba Biblioteko troviĝas en la dua etaĝo tie, sub la sveda biblioteka kodo Fy (tiu "fia" kodo signifas "artefaritaj lingvoj"). Nun 644 el niaj libroj estas deponitaj en la Urba Biblioteko; al tio aldoniĝas 189 libroj kiujn la urbobiblioteko mem posedas. (Dum la jaro la Urba Biblioteko de Falun donacis 230 librojn al la Gotenburga Urba Biblioteko. El tiuj libroj 41 doniĝis al la Nilsona Fonduso.) En la komputila katalogo de la Urba Biblioteko nun troveblas 661 E-libroj.

Revuoj abonataj: *Esperanto*, *Eventoj*, *Kontakto*, *Literatura Foiro* kaj *Monato*. La revuoj troviĝas en la klubejo. La komitato por la Nilsona Fonduso konsistas el: Ebbe Vilborg (prez.), Kent Grahn (kasisto), Christer Lörnemark (sekr.); anstataŭantoj Inga Johanson

kaj Andreas Nordström. La komitato elektiĝas dum la jarkunveno de la Esperanto-Alianco de Gotenburgo, kaj respondecas al tiu organizo.

Christer Lörnemark
(El *Inter-ligilo* 2:98)

Renkontiĝo kun Idisto

La 13-an de januaro la Usona Idisto Tom Todd vizitis Gotenburgon, kaj okazis interplanlingva renkontiĝo inter li kaj kelkaj Esperantistoj en nia klubejo.

Ido kreiĝis 1905-1907 de grupo de Francoj, ĉefe de Louis Couturat kaj Louis de Beaufront (la lasta estis unu el la ĉefuloj de la Esperanto-movado). La grupo malkontentis pri certaj lingvaj trajtoj de Esperanto, kaj kredis ke nia lingvo havus pli da sukceso se oni "reformus" Esperanton. La plej multaj Esperantistoj, inter ili Zamenhof, rifuzis ŝanĝi la bazan strukturon de Esperanto, timante ke nia afero disfalus se oni komencas arbitre ŝanĝadi la lingvon: farinte unu bazan ŝanĝon oni same bone povus fari alian ŝanĝon, kaj ne estas klara limo je tio kie oni haltu. Ies plibonigo estas alies malbonigo. Kaj kiu volus lerni lingvon kiu draste ŝanĝadas?

Estiĝis tre akra skismo inter Esperantistoj kaj Idistoj.

Nuntempe iom pli ol 150 homoj parolas Idon en la mondo; multaj el ili ankaŭ membras en la Esperanto-Movado. La sinteno de Idistoj al Esperanto varias: kelkaj malŝatas Esperanton, aliaj estas ordinaraj Esperantistoj kun nur hobia scio de Ido.

La du lingvoj similas unu la alian kvazaŭ dialektoj (iom simile al la Norvega kaj Sveda). Kelkmlil vortoj malsamas; ekzemple "letero" nomiĝas "letro" en Ido, "internacia" estas "internaciona".

S-ro Tom Todd, 85-jarulo el la federacia ŝtato Michigan, iomete rakontis pri la Ido-movado. Mem li estas kvazaŭ duona landmovado, ĉar troviĝas nur du idistoj en Usono. Bedaŭrinde sinjoro Todd (kiu ne estas Esperantisto) ne parolis Idon flue, kaj la diskuto kun li pro tio okazis en la Angla!

Estas foje interese paroli kun anoj de aliaj planlingvoj, pri kio motivis al ili ne elekti Esperanton, kiun ja parolas tiel multaj, sed anstataŭe elekti pli minoritatan lingvon. Plej ofte temas pri trokredo ke lingvaj detaloj povus influegi al la akcepto de planlingvo. Sed sociaj faktoroj ja ĉefas por la monda akcepto aŭ neakcepto de Esperanto.

Christer Lörnemark
(El *Inter-ligilo* 1:98)

NEKROLOGO

Karl-Erik Eriksson 1924-1998

La kasisto de la sveda sekcio de KELI mortis la 17-an de februaro 1998. Je vizito ĉe Karl Buremo en Jönköping li pakis sian aŭton plenplena de libroj, kasedoj, skribmaŝinoj k.t.p. Post unu-hora veturado li veturis kontraŭ montomuro. Li iĝis operaciita en la malsanulejo en Linköping sed ne ricevis la konsciencon.

Li naskiĝis la 30-an de marto 1924 kaj iĝis membro de baptista asocio. En Tostarp, Skanio, li partoprenis Esperantan kurson, kiun gvidis Anna Alamo, poste Sandgren. Li iĝis membro de KEF (Kristliga Esperantoförbundet) 1949. Li estis ankaŭ membro de Linköpings Esperantoklubb.

Post la ekumena kongreso en Gostýn, Pollando, 1994 Karl-Erik iĝis kasisto de KEF. Dum la Balta esperanta semajno en Haapsalu, Estonio, pasintjare multaj eksterlandanoj ekkonis lin.

Lia granda intereso estis helpi la suferantajn infanojn en la antaŭe socialistaj landoj. En la organizo "Hjärta till hjärta" li ĉiutage pakis pakajojn por infanhejmoj en Rumanio.

Karl-Erik estas funebrata de la edzino Stina, infanoj kaj genepoj. Kaj la sveda sekcio de KELI kaj ĝia internacia estraro perdis fidelan kunlaboranton.

Arne Lundkvist

Adreso kun @esperanto nun facile aranĝebla

SEF havas sian interretan abondon ĉe la sveda kompanio Algonet. Ĉiuj membroj, kiuj havas sian abondon ĉe la sama kompanio, povas per simpla retletero al sef@esperanto.se peti alternativan adreson, kiu estos vianomo@esperanto.se. Indiku nur, kiun retnomon vi deziras uzi kaj kiu estas via abononoma ĉe Algonet. Tiu servo estas senpaga por la membroj. Notu, ke tio ne anstataŭas vian nunan abondon, nur kompletigas ĝin. Via retpoŝto daŭre aperos en la baza leterkesto.

Tiuj, kiuj ne havas abondon ĉe Algonet – kaj membroj kaj ne-membroj de SEF – povas mendi similan solvon ĉe esperanto.nu, ankaŭ senpage. Vizitu la tt-ĉejon <http://esperanto.nu/retadreso/>, plenigu formularon kaj post nelonge vi povos ekuzi la retadreson vianomo@esperanto.nu. Ankaŭ en ĉi tiu kazo validas, ke vi jam devas havi retadreson (povas esti laboreja), kien la retpoŝto alvenu.

La avantaĝoj de tiu solvo estas du: vi ekhavas adreson, kiu tuj montras vian ligan al esperanto kaj – speciale en la kazo de @esperanto.nu – vi povas havigi multe pli simplan adreson. Vi povas al la sama baza leterkesto adresigi diversajn retnomojn, ekzemple de la unuopaj membroj de via familio.

Bona ideo estas aranĝi tian adreson por la esperanto-klubo, kun plusendo al iu estrarano.

Franko Luin

Filatelo

Germana samideano kolektas poŝtmarkojn de la iama GDR sur kovertoj, poŝtkartoj kaj pakumaj paperoj. La tarifo devas esti la ĝusta, ne tro multe. Dum 1990 ankaŭ eblis uzi misafrankojn kun poŝtmarkoj de GDR kaj FRG.

Ĉi tiu filatelisto do petas vin trafosi viajn malnovajn stokojn de kovertoj, poŝtmarkoj k.t.p. kaj sendi al li la taŭgajn. Li pagos por la filatelaĵoj kaj ankaŭ por la sendokostoj. Interŝanĝo ankaŭ eblas kontraŭ simila materialo de alia lando. Li ankaŭ interesiĝas pri stoko de aliaj kovertoj kaj neuzitaj poŝtmarkoj de Germanio.

Manfred Kirsch
Brandstr. 21
D - 04626 Schmölln
Germanio
tel./fakso 00949 34491 23400

Kolekto 2000


SEJU:s nybörjarkurs den 2/8-9/8

Nu har du chansen att lära dig esperanto på SEJU:s nybörjarkurs. Den är öppen för alla åldrar och hålls på Esperanto-Gården veckan före KEF. Vi börjar med att lära känna varandra och inkvartera oss den 2 augusti, och dagen efter kör vi igång på allvar med lektioner. Dessa kommer vi sedan att blanda med utflykter och annat skoj. Efter en vecka pratar man kanske inte flytande esperanto, men en hel del har man lärt sig. De som sedan stannar på Esperanto-Gården för att vara med på KEF veckan efter kursen, kommer att få många tillfällen att använda sina nya kunskaper och lära sig mer.

Priset blir 540 kronor för maten, som vi delvis hjälper till med att laga, och 630 kronor för logi om du vill sova i fyrbäddsrum på Esperanto-Gården. Du som tar med dig sovsäck och liggunderlag kan sova på golvet för 210 kronor. Avgift för kursmateriel tillkommer. Mer information kan du få av

Anna-Lena Eriksson
<anna-lena@esperanto.nu>
tel. 0522-30128

som också tar emot anmälningar.



Okaze de la 10-jariĝo de EUROKKA kaj kunlaborado kadre de Kampanjo 2000 VINILKOSMO (la diskeldonejo de EUROKKA) lanĉas la projekton Kolekto 2000. Temas pri kompaktdiska kolekto kiu startos ekde printempo 1998 ĝis jaro 2000 aŭ 2002.

La celo estas aperigi dum tiu periodo serion de minimume dek 6/8-titolaj KD-oj el diversaj Esperanto-artistoj. La unua KD planita, tiu de JoMo, devus aperi en aprilo/majo 1998 por festi la 10-jariĝon de EUROKKA. La dua kun kantoj de Brassens en Esperanto interpretitaj de Jacques Yvart, estus preta por la 83a UK en Montpe-

liero. Pluraj esperanto-bandoj kaj artistoj estis kontaktitaj kaj interesiĝas pri la projekto; kiel ekzemple La Kompanoj el Bordoza (Francio) kaj la fama esperanto-rok-bando Persone el Svedio.

Hodiaŭ EUROKKA/VINILKOSMO serĉas financantojn, monsubtenantojn, mecenatojn kaj partnerojn por realigi sukcese tiun projekton, kies celo estas plikreskigi kaj pliriĉigi Esperanto-muzikkulturon surbaze de arta, profesia kaj teknika kvalito; vi povas fariĝi unu el tiuj gravaj subtenantoj.

Por pliaj informoj kaj klarigoj kontaktu VINILKOSMO-n ĉe:

EUROKKA
(Esperanto-Rok-Asocio)
FR-31450 Donnevillle
Francio
tel./fakso: 009-33-561819565

Esperantolinje 1998-99

Under en termins intensivstudier i esperanto – 22 timmar/vecka – kan Du som nybörjare nå en nivå, där Du inte bara kan läsa och skriva utan även tala språket. Efter 4 månaders studier kan Du avlägga skolans internationella esperantoexamen, som är prope-deutisk för Internationell Examen.

Undervisningen är från första början helt på esperanto, initialt med bilder och enkla strukturer. En dramatisk termin väntar Dig med internationella kontakter. Med esperanto lär Du Dig inte bara ett planerat, neutralt språk utan Du gör också en insats för förståelse över gränserna, rättvisa mellan alla språkkulturer, solidaritet och fred. Många kallar esperanto för brodersmålet!

Kurstider

Terminskurs 31/8 - 18/12 1998
Sommarkurs 9/6 - 18/6 1998

Boende

Om Du väljer att bo på skolan, får Du bo i ett hus med 13 enkelrum. Varje rum har kylskåp, dusch och toalett. Gemensamt för alla i huset är pentry, klädvårdsrum och dagrum med TV.

Kostnad per termin

Internatelev (mat må-fr inkl. kvällsmat må-to) ca 12.820 kr
(800 kr/v)
Externatelev med lunch 3.530 kr (220 kr/v)
Externatelev utan lunch 800 kr
Studielitteratur ca 200 kr

Studiestöd

Nordiska elever utanför Sverige kan söka stipendier från Nordens Folkliga Akademi, Box 120 24, 402 41 Göteborg.

Stipendier finns också att söka från Svenska Esperantoinstitutet, Sö Stommen 112, 438 32 Landvetter.

Vad gäller studiestöd från CSN, kontakta närmaste arbetsförmedling.

Vem frågar man


Ring gärna linjeföreståndare Lars Forsman om Du vill veta mera, tel. 0586-64600.

Sten Svenonius
Vendelsfridsq 4C
21764 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm



KRUCVORTA ENIGMO



Horizontale

- 1 Rilate al peno ne renkonti iun - Post dua
- 2 Ne staras - Superfluj'
- 3 Estas oratoro
- 4 Popolgrupon - Monunu'
- 5 Taĉment' - Via - Luno de Jupitero
- 6 Membrokolektaĵon Sekve
- 7 Malneus
- 8 Danc' - Ne via
- 9 Valoraj' - Brilanta
- 10 Ino en skandinavia mitologio - Rifuzas

Vertikale

- A Lingvon
- B Boninklinon - Kolektaĵo
- C Egalajn
- Ĉ Osto de la piedo - Estran'
- D Estos plej gravaj de io - Duono de Romo
- E Superakvig'
- F Komunikila - Ne mian
- G Organa - Membre
- Ĝ Kroata duoninsulo - Fino de finita
- H Komenco de batalo - Grup' en lernejo

Världen i Aros 93,7 MHz

Radió Esperanto har bytt namn! Vi sänder 30 min mellan kl. 16.30 och 17.00 varje söndag.
Lyssna varje söndag kl. 16.30-17.00 till reportage, intervjuer m.m. från Esperantovärlden genom Världen i Aros på 93,7 MHz.
På radions hemsida (Internet) annonserar vi innehållet i våra program. Adressen är:
<http://www.quicknet.se/home/q-111060/radioe.htm>
Varje onsdagskväll kan du träffa oss på redaktionen i FMVs studio.

SOLVO DE 98/2

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	K	O	L	O	R	I	G	A	D	O
2	O	F	E	R	U	S	L	I	R	
3	R	E	K	T	I	G	I	T	A	N
4	P	R	U	O	N	N	A	M	A	
5	E	T	A	P	O	D	R	A	M	
6	A	V	E	N	T	U	R	N	I	
7	K	N	E	O	S	A	T			
8	A	N	O	A	S	T	R	O	N	
9	T	R	O	N	U	T	R	A	E	
10	O	J	N	S	T	I	N	K	I	

Lennart Persson

(Ur La VEKa Bulteno 1/1998)